





# *tempo*

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo  
*Ĉasopis Hrvatskog saveza za esperanto*

majo 2015 / n-ro **124**



-  Esperanto en la listo de nacia kultura heredaĵo de Pollando
-  Speciala numero pri Esperanto de la anglalingva kroata scienca revuo INDECS
-  KEL elpagis la grandan krediton por Vodnikova
-  Bjelovar gastigos ILEI-festivalon en 2016

Ĉe la fino de la jaro 2014 ĝojigis la fakto ke Ministerio pri kulturo de **Respubliko Pollando** metis Esperanton en la nacian liston de nemateria kultura heredaĵo. Per tio Esperanto povos nur gajni. Almenaŭ oni rekonu kaj donu prestiĝon al la lingvo en la propra naskolando! Ĉu eblus imagi ke iam Esperanto estos sur la listo de nemateria kultura heredaĵo de **Kroatio**? Ankaŭ en **Kroatio** ĝi havas siajn parolantojn pli ol cent jarojn.

Informa katolika agentejo IKA diskonigis pri la kunveno „Dialekta literaturo – modelo pri nacia literaturo“ kiun de la 8a ĝis la 11a de oktobro 2014 organizis la esperantistino **Marija Belošević** kun la organizo Kroata Esperantista Unuiĝo. Prelegis la profesoroj **Sanja Vulić, Ivan Golub, Duro Vidmarović**. El eksterlando al la temo kontribuis **Jurica Csenar, Paola Giommoni, Edvige Ackermann kaj Elda Doerfler**.

Okaze de la jarfinaj ŝanĝoj du niaj junaj membroj spertis en **Weisswasser** en **Germanio** la internacian etoson en Junulara E-Semajno: **Tihana Mikša kaj Filip Mikuličić**. Ili profitis el anonima subvencio por la kotizo kaj restado, samkiel la subvencio por veturkostoj, kiun ofertis niaj membroj **Anto Mlinar, Davor Klobučar kaj Đivo Pulitika**.

En la interretaj paĝoj de KEL ([www.esperanto.hr](http://www.esperanto.hr)) aperis lastatempe gravaj novaĵoj, dank' al nia fervora informatikisto kaj vicprezidanto **Davor Klobučar**. La plenan kolekton de nia gazeto **Tempo** el 123 numeroj (1980 – 2014) li metis al nia paĝaro kaj tiel disponigis la kolekton al ĉiuj. Tre diligenta laboro, ĉar li mem skanis 90% da tiu kolekto! Vidu ĉe [http://www.esperanto.hr/tempo\\_kel.htm](http://www.esperanto.hr/tempo_kel.htm)

Sed post tio li iniciatis novan laboron: kun helpo de **Spomenka Štimec** li traktis pri interreta publikigo de la Grandaj Vortaroj (kroata-esperanta kaj esperanta-kroata), kiujn verkis nia membrino **Lucija Borčić** kaj eldonis la firmao Sveučilišna knjižara de nia membro **Damir Mikuličić** kaj KEL. Post ricevo de ĉiuj permesoj, la PDF-dokumentoj de ambaŭ vortaroj (rapide serĉeblaj) estas nun en nia retejo: <http://www.esperanto.hr/vortaroj.htm>

Dank' al fervoro de **Vjekoslav Morankić** el **Esperanto-societo Rijeka**, aperis en nia retejo pluraj novaj interesaj

materialoj: **Statuto de KEL el 1945** sub la nomo „Statut Saveza esperantista Hrvatske“ ([http://www.esperanto.hr/heliko/kel\\_statut\\_1945.pdf](http://www.esperanto.hr/heliko/kel_statut_1945.pdf)), kaj plena kolekto de la revuo **Heliko** (el Rijeka).

Fine de la jaro 2014 **Grafokom** el **Đurđevac** riĉigis esperantan eseon arton per preso de la libro de D-ro **Ivo Lapenna**, konsistanta el liaj artikoloj sietempe aperintaj en la revuo **Horizonto**. Iniciatinto de la eldono estas **Birthe Lapenna kaj Fondaĵo Ivo Lapenna**. La bela libro havis sian prezenton dum **Zamenhof**-tago en **Zagrebo**.

Kroataj esperantistoj adiaŭis decembre de la jaro 2014 per du programoj honore al **Zamenhof**-tago, la 12an de decembro en Eŭropa domo kaj la 15an en Kroatia ekonomia ĉambro.

**Zdravko Seleš** publikigis honore al la poeto **Fran Galović**, okaze de la centa datreveno de lia morto, la eseon **Galović kaj zaĉne stvari /Galović kaj la lastaj aferoj**. Per **Kaŝtanarbo** de **Fran Galović** en traduko de **Josip Velebit** ni omaĝas al ambaŭ, la poeto kaj lia tradukinto.

Frato de nia forpasinta membro **Mira Matanović-Manner, Anto Matanović** per tre bela maniero omaĝis al eminentaj esperantistoj, agintaj en **Kroatio** kaj **Svislando**, la fratino **Mira** kaj la bofrato (ŝia edzo) **Mirko Mamužić-Manner**: por subteni la pli rapidan elpagon de kreditoj por nia ejo en la strato **Vodnikova, Anto Matanović** enpagis al KEL 40.000 kn memore al siaj familianoj! Per tio nia kredito de 50.500 eŭroj ĉe Raiffeisenbank el la jaro 2003 komplete finiĝis kaj konsiderinde reduktiĝis la aliaj lastaj malgrandaj kreditoj.

Post tiu belega novaĵo, kiu realiĝis dank' al la valora subteno de niaj membroj, bonvolu vidi kuraĝigan informon pri la stato de niaj aliaj kreditoj por **Vodnikova 9**. Estas mirinde vidi kiom fortan rezulton povas doni la kunlaboro de la membroj!

Okaze de estingiĝo de Premio **Cigno** en **Japanio** (kiun adiaŭe en 2015 gajnis landa Asocio de **Slovakio**) Kroata Esperanto-Ligo, la lastjara gajninto, partoprenis, laŭ la invito de la mecenato **Etsuo Miyoshi**, per nia cento da priesperantaj artikoloj el 2014.

La diligenta eldonejo **Grafokom** el **Đurđevac** publikigis en 2014 verkon

de la rumana verkisto **Ferenc Szemler** sub la titolo **La triĝiba monto**, kiun esperantigis el la hungara **Lenke Sász**.

En Literatura konkurso **Ivo Rotkvić** kiun relanĉis Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj 2014 en la branĉo Originala poezio la unuan premion gajnis **Emilija Obradović** per la poemo **Sed kial, avinjo?** La dua kaj trian premion gajnis **Suso Moinhos** el **Hispanio**. La unua premio por la originala prozo iris al **Bulgario**, al **Georgi Mihalkov** kaj la dua al **Ewa Grochawska** el **Francio**.

**Esperanto-Societo „Trixini“** finmuntigis en februaro 2015 porhandikapulan necesejon en Elementa lernejo de Speciala hospitalo por rekapabligo **Krapinske Toplice**, investante **25.000 kn** en la ejon. La solenaĵon en la lernejo okaze de transdono de la objekto al la direktoro **Antun Zupanc** ĉeestis vicestrino de la departemento **Jasna Petek**. La departemento mem kontribuis per aldonaj 3.000 kn por la adapta laboro. (Vidu la fotojn kaj detalojn ĉe [http://www.esperanto.hr/agado\\_trixini\\_toalet.htm](http://www.esperanto.hr/agado_trixini_toalet.htm)).

**Mirelle Grosjean**, prezidantino de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj, kaj **Radojica Petrović**, sekretario kaj estrarano pri konferencoj de **ILEI**, informis **Kroatan Esperanto-Ligon** ke **ILEI**-konferenco ne okazos en 2016 en **Kroatio**, laŭ la invito de Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto, Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj, Dokumenta Esperanto-Centro **Đurđevac** kaj gastigo fare de **Bjelovara Esperanto-Societo** ĉar ĝi en 2016 gastos en **Hungario**. Anstataŭe **Kroatio** gastigos festivalon de kulturo kaj pedagogio de **ILEI**, sub la nomo **ILEI-fest** post la konferenco en **Hungario**, okazonta en **Nyíregyháza**. Al la aranĝo de **ILEI** en **Kroatio** en aŭgusto 2016, kun multaj koncertoj, poeziaj vesperoj, beletraj konkursoj kaj pedagogiaj forumoj, ni niajn membrojn jam nun elkore invitas.

**Judita Rey Hudeček** gastis per priesperantaj temoj en la prestiĝa radio-elsendo **Kafumante kun Sonja** en programo de la zagreba **Radio Sljeme** kaj ĵurnalisto **Sonja Šarunić** la 18an de marto 2015 je la 15a horo kaj 13 min.

**Siniša Dvornik** kaj **Kikushima Kazuko - Krizantemo** vizitis en marto en Banjaluka la malsanan bosnian kantistinon **Jadranka Stojaković**.

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvar foje jare. J. Jaro XXXIV, numero 124 (1-2015). ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de **Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio**.

Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj. Voĉlegas Spomenka Štimec.

**Redakcio/Uredništvo; Eldonisto/Izdavač:** Hrvatski savez za esperanto/Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11/III, HR 10000 Zagreb, Kroatio, tel. +385 (1) 4617550, [esperanto@zg.t-com.hr](mailto:esperanto@zg.t-com.hr), [www.esperanto.hr](http://www.esperanto.hr), IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

**Kontribuis:** Lucija Biličić, Mihaela Cik, Boris Di Costanzo, Akhtar Etemadi, Fran Galović, Grozdana Grubišić-Popović, Kaja Farszky, Zvonimir Ferina, Marija Franz, Anne Jausion, Kikushima Kazuko - Krizantemo, Davor Klobučar, Anto Mlinar, Judita Rey Hudeček, Anton Mihelić, Tihana Mikša, Anto Matanović, Vjekoslav Morankić, Lucia Popović, Jozef Reinwart, Ivanka Seleš, Zdravko Seleš, Dalibor Seatović, Ivan Špoljarec, Spomenka Štimec, Zlatko Tišljar, Josip Velebit.

**Redaktoris:** Spomenka Štimec. **Grafika aranĝo kaj prespreparo:** Ivan Špoljarec. **Presis:** Urednik d.o.o., Zagreb

**Anonctarifo:** 1/1 paĝo 1000kn (135 eŭroj), 1/2 paĝo 500 kn (68 eŭroj), lasta titolpaĝo 2500 kn (3.28 eŭroj). **Abono** por 4 numeroj jare 60 kn. Por eksterlando 10 eŭroj. Unuopa numero enlande 15 kn, eksterlande 3 eŭroj.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Foto sur la titolpaĝo: **Zagreb**. Fotis **Lucija Biličić**.



*Estraro de KEL (novembro 2014). Sidas de maldekstre: Judita Rey-Hudeček, Dalibor Šeatović, Spomenka Štimec, Grozdana Grubišić-Popović, Boris Di Costanzo. Staras de maldekstre: Faruk Islamović, Anto Mlinar, Davor Klobučar.*

Željka Bradić gvidis aprile koreajn gastojn tra Zagrebo.

D-rino Ilona Koutny gastis en la fako de la hungara lingvo en la zagreba Filozofia fakultato en marto kaj Esperanto-Societo Tibor Sekelj gastigis ŝian prelegon en la ejoj en Knez Mislav. Ŝi ekskursis al Varaždin, en la Tago de la poezio la 21an de marto 2015. (Vidu ĉe: [http://www.esperanto.hr/agado\\_koutny\\_2015.htm](http://www.esperanto.hr/agado_koutny_2015.htm))

Tute apartan surprizon prezentis al ni juna kunlaborantino el Budapeŝto kaj estrarano de TEJO Poór Veronika: kiam KEL invitis ŝin al Kroatio, al Renkontiĝo de verkistoj, ŝi gastis ankaŭ ĉe Ďivo Pulitika, prezidanto de KEJA. Ŝi profitis la zagreban restadon por kontakti siajn kolegojn sciencistojn en la redakcio de la kroata scienca anglalingva revuo INDECS, **Interdisciplinary description of complex systems**. Dank' al tio, la ĉefredaktoro Josip Stepanić proponis unu numeron de la revuo dediĉi al Esperanto. Kaj jen ĝi legebla ĉe [http://indecs.eu/index.php?s=13\\_2&y=2015](http://indecs.eu/index.php?s=13_2&y=2015). La papera versio de la scienca revuo INDECS estos prezentata dum Universala Kongreso de Esperanto en Lille. Kontribuantoj estas la plej prestiĝaj sciencistoj de la Esperanto-komunumo: **H. Tonkin, D. Blanke, W. Blanke, I. Koutny, S. Fiedler, F. Gobbo, D. Charters, W. Jansen, S. Konishy, A. Wandel**. Inter tiuj altrangaj mondaj sciencistoj-esperantistoj troviĝas ankaŭ juna kroata kontribuanto **Kruno Puškar** kun sia temo *Esperanto (s)en perspektivo? Croatian Esperantists on the International Language Esperanto*. Ministerio pri scienco, edukado kaj sporto financis tiun numeron de INDECS. Vidu ankaŭ ĉe niaj paĝoj: [http://www.esperanto.hr/agado\\_indecs\\_sciencia.htm](http://www.esperanto.hr/agado_indecs_sciencia.htm)

Eble tio estas la plej granda sukceso

en la kampo de la scienco en Kroatio en la lastaj jaroj.

Zagreba banko donis al KEL atestilon okaze de sia centa jubileo, kiam la banko invitis arkivigi iun objekton... por la venontaj cent jaroj. Por la venontaj cent jaroj ni metis en la bankon la Esperanto-lernilon laŭ la Zagreba Metodo.

La muzikistino **Kaja Farszky** kontribuis ĉi-jare al la zagreba muzika festivalo **Biennale**.

En oktobro 2014 startis en Kroatio nova leĝo pri asocioj, kiu devigas ĉiujn asociojn adaptiĝi al ĝi. Pro tio, en la unua duonjaro niaj asocioj vole-nevole aktivis por adapti sian statuton al la nova leĝo. Tial multaj jarasembleoj okazis jam en la unuaj monatoj de la jaro 2015: Kroata Fervoja Esperanto-Asocio la 10an de marto 2015, Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Asocioj – KUNE la 14an de marto 2015 kaj Esperanto-Societo **Trixini Hraščina** la 11an de aprilo 2015 dum bjelovaraj esperantistoj sian jarkunvenon havis la 24an de majo. Prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo **Anto Mlinar** partoprenis en kelkaj seminarioj por spertiĝi pri juraj kaj financaj aspektoj de la nova leĝo kaj dissendis helpinstrukciojn al ĉiuj asocioj membrantaj en KEL por helpi ĉe la deviga adaptado de la statutoj.

**Srećko Radulović** el **Sisak**, nekontenta pri la kvanto de tiel akirita scio, organizis seminarion pri tiu temo kun fakaj prelegantoj en Zagrebo la 27an de marto 2015. Li ne trovis kontentigan reehon inter membroj de KEL por tiu prelegaro.

Junaj membroj enplektiĝis en eŭropan projekton pri **Himnoj**, kiun gvidas **Flory Wietdoeck** por Eŭropa Esperanto-Unuiĝo. Aparte al la projekto per siaj fotoj kontribuis **Lucija Biličić**. Pri la projekto ili prelegis en **Esperanto-Societo Tibor Sekelj** la 6an de majo

2015.

**Mihaela Cik** kontribuis la 15an de aprilo 2015 al prezento de libroj de sia instruisto **Zdravko Seleš** en la ejo de Asocio de kroataj verkistoj.

Eŭropa festivalo de kantoj en Esperanto en la pola **Vroclavo** la 22-an de majo gajigis geknaban ensemblon **Gajuletoj** el Elementa lernejo **Davorin Trstenjak** en **Zagrebo**: La kantado ekzercita de **Silvija Fostač** gajnis la duan premion.

La 30an de majo Esperanto-Societo **Trixini** en **Hraščina** organizis la 19an Meteoritan feston, ĉi-jare dediĉitan al la temo de holokaŭsto en **Zagorje** kaj prezentis la libron **Savitaj el Zagrebo/Spaŝeni iz Zagreba**, de **Paul Schreiner**, la iama posedanto de la tegolfabrika en **Bedekovčina**. El la verko legis la aktoro **Kristijan Potočki**. La temon prezentis la verkistino **Jasminka Domaš**. Judajn kantojn kantis **Neven Mrzlečki**. La aŭtoro mem ĉeestis.

Renkontiĝo de verkistoj okazos de la 11a ĝis la 13a de septembro 2015 en **Hraščina** kun la ĉefaj temoj por publiko sabaton la 12an de septembro. Informoj kaj fotoj pri la malnovaj verkistaj renkontiĝoj kaj iam poste ankaŭ pri la nova estas ĉe: <http://www.esperanto.hr/verkistoj.htm>

Esperanto-Societo Liberiga Stelo perdis pro forpaso du siajn tre valorajn membrojn **Marija Franz** kaj **Saša Kocian**.

**Spomenka Štimec** kontribuos en julio al la kongresa temo en **Lille**, okaze de la centa **Universala kongreso de Esperanto** per prelego al la ĉeftemo **Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj**.

La konatan kroatan infanlibron **La trajno en la neĝo** de **Mato Lovrak** eldonis **Bjelovara Esperantista Societo** kaj **Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj** en traduko de **Josip Pleadin**. La titolpaĝon ilustris lernantino el **Veliki Grdevac, Renata Đuričić**.

La dua eldono de **Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić** estis ekspoziciita en la maja Librofoiro en **Teherano** okaze de la represo de pliaj 5000 ekzempleroj de en la persa.

Ĉi tiun numeron de Tempo financis Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio.

En aprilo Ministerio pri kulturo sendis al ni sian malkuraĝigan leteron kun informo, ke ĝi estonte ne plu povos financi nian agadon. Tamen, nia agado ne rajtas ĉesi. Tial ni invitas vin septembre al **Hraščina** por Renkontiĝo de verkistoj kaj al **Bjelovar**, al la programoj de **Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo** kaj oktobre al **Opatija**, kie okazos Alp-Adria konferenco.

Bonan legadon!

*S. Štimec, D. Klobučar*

## Esperanto en la listo de **nemateria kultura heredaĵo** de Pollando

Ekde lastaj semajnoj de 2014 Esperanto estas en la listo de pollanda nemateria kultura heredaĵo. La oficialigo okazis per subskribo de la dokumento fare de la ministrino pri kulturo de **Respubliko Pollando** prof. dr. hab. **Malgorzata Omilanowska** la 31an de oktobro 2014. Por la oficialigo grave meritis pola grupo de la internacia organizo Eŭropo-Esperanto-Demokratio kaj ties membro **Kazimir Krzyzak**. La oficialigo ne povus okazi sen subteno de la pola senatano **Edmund Wittbrodt**, kiu subtenas Esperanton kaj pretas fari pli multe por ĝia prestiĝo. Senatano **Wittbrodt** estas gvidanto de la parlamenta grupo en la pola Senato apoganta Esperanton. Por ke Esperanto eniru nacian liston de nemateriaj heredaĵoj necesis kunlaboro de multaj

individuoj kaj polaj institucioj, kiuj kolektis 1600 subskribojn por la peticio.

Varsovio estis la plej grava hejmo de **Zamenhof**, la loko, kie aperis la unua lernolibro de Esperanto en 1887. **Varsovio** estas la hejmo de Esperanto.

Per enskribo en la liston de pola nemateria kultura heredaĵo estas konfirmitaj la radikoj de Esperanto. Per tiu konfirmo Esperanto ne perdis sian universalecon. Kaj espereble iun tagon tio helpos al iaspeca oficialigo de Esperanto en **Eŭropa Unio**, kies membro **Pollando** estas...

Kroata Esperanto-Ligo gratulis kaj dankis al Ministerio pri kulturo de Respubliko **Pollando** per letero al Pola ambasadejo en **Zagrebo** por tia prestiĝigo de Esperanto.

*S. Ŝtimec*



*De maldekstre:*  
- senatano prof. dr hab. Edmund Wittbrodt  
- ministro de kulturo kaj nacia heredaĵo Malgorzata Omilanowska  
- ano de Pola Societo EDE Kazimir Krzyzak

## Konsideroj de prezidantino de Respubliko Kroatio **Kolinda Grabar-Kitarović** pri lingvaj demandoj de EU

Ekde januaro 2015 **Kroatio** havas novan ŝtatestron, prezidantinon **Kolinda Grabar-Kitarović**.

De niaj slovakaj kolegoj ni ricevis ŝian leteron el novembro 2007 al **Dušan Čaplovič**, slovaka vic-ĉefministro kaj ministro pri eksterlandaj aferoj. En la letero videblas ŝiaj starpunktoj pri la eŭropa lingvopolitiko. Tiutempe s-rino **Grabar-Kitarović** estis kroata ministrino pri eksteraj aferoj, kaj Kroatio ankoraŭ ne estis EU-membro. Elangligis **Davor Klobučar**.

Respubliko Kroatio  
Ministerio pri eksteraj aferoj kaj eŭropa integriĝo  
La ministrino

Kara s-ro vic-ĉefministro,

Dankon pro via letero en kiu vi informas min pri la iniciato de Slovakio kaj de aliaj ŝtatoj de Višegrad-grupo rilate al kreado de plene ellaborita eŭrop-unia lingva politiko. Mi povas al vi garantii, ke la iniciato ricevos nian respektoplenan atenton kaj konsideron.

Sendube, konservado kaj elstarigo de la kultura diverseco, inkluzive la lingvan diversecon kaj lingvolernadon en Eŭropo estas unu el la ĉefaj ŝtonoj kiuj subtenas la eŭropan projekton, farante la multlingvecon speciala trajto de EU kaj baza komponento de la eŭropa kulturo.

Kiel esprimo de tiu ĉi diverseco, lingvoj havas fundamentan signifon por la eŭropanoj kiuj volas kune labori, kaj antaŭenigo de la multlingveco povas esti grava elemento de la kultura, ekonomia kaj socia integriĝo de EU. Ĝi kondukas al pli bona interkompreniĝo, plifortigas toleremon inter la popoloj kaj ankaŭ kontribuas al konkurenco de la eŭropa ekonomio. Ĝi ankaŭ konsistigas gravan ligan inter EU kaj aliaj nacioj de la mondo.

El la vidpunkto de la kreskanta lingva heterogeneco de la EU-membroŝtatoj, kio faras tenadon de la multlingveco komplika, estas kompreneble, ke bezono pri unu plene ellaborita lingva politiko estas eĉ pli grava.

Mi konsentas kun vi, ke kreado de tia politiko forigus ĉiujn dubojn rilate al pozicio de naciaj lingvoj en komparo kun iuj pli larĝe parolataj lingvoj.

Kiel ŝtato-kandidato estanta en procedo de traktado pri EU-membreco, Kroatio sekvas la evoluon de tiusencaj diskutoj en EU. Post akcepto en EU, uzo de la kroata lingvo kiel unu el la oficialaj lingvoj en la EU-institucioj pliriĉigos kulturalan diversecon de EU kaj kondukos al konservo de nacia identeco de EU-membroŝtatoj, en la spirito de unueco en diverseco gvidante al pli granda solidareco kaj interkompreno.

Konklude, Kroatio bonvenigas ĉiun agadon celantan ellaboron de la tutkompleksa lingva politiko kaj garantiantan socio-lingvistikan spacon por ĉiuj eŭropaj lingvoj, kaj ĝi estas preta kontribui al diskutoj pri tiu temo.

Mi samopinias kun vi, ke la diskutoj devus komence okazi je la fakula nivelo, tiom pli, ke tio ĉi estas afero tikla kaj kompleksa, kiu devus esti trastudita plene kaj analizita el ĉiuj vidpunktoj.

Via sincere,  
Kolinda Grabar-Kitarović

# Donaco por KEL memore al **Mirjana Matanović-Manner** kaj **Mirko Mamužić-Manner**

**Anto Matanović**, frato de nia forpasinta membro **Mirjana Matanović-Manner** (1925-2010) havis noblan ideon por honori la memoron pri sia fratino **Mirjana - Mira** kaj ŝia edzo **Mirko Mamužić-Manner** (1927-1998). Post multaj jaroj da poresperanta agado en **Kroatio** ili ambaŭ agadis en Svislando, kie **Mirko** ricevis gravan inĝenieran postenon. Lia edzino forlasis sian laboron de lerneja pedagogo kaj sekvis la edzon al **Svislando**. Preskaŭ neniu Universala Kongreso de Esperanto en la lastaj jardekoj de la 20a jarcento pasis sen ilia partopreno.

**Mirko** mortis antaŭ ol realigi sian ideon pri reveno al **Kroatio** kaj al **Zagrebo** revenis **Mira** sola. Post lia morto ŝi ekaktivis en Esperanto-Societo **Bude Borjan**, kie ŝia edzo iam instruis al ŝi Esperanton.

En 2015 la frato de **Mira** (kaj amiko de Esperanto) **Anto Matanović**, kiun **Mira** partoprenigis en Universala Kongreso de Esperanto en **Florenco** (2006), kontaktis Kroatan Esperanto-Ligon kaj proponis financan kontribuon al KEL por fari daŭran memoron pri la geedzoj **Mamužić-Manner**. Lia propono estis tre malavara: per 40.000 kn li kontribuis al la repago de kreditoj por nia ejo en Vodnikova 9.



**Anto Matanović** proponis ke en la sidejo de KEL surmure pendu ilia foto. La memoraĵon pri **Mira** kaj **Mirko** kreis en la formo de „Donacilo“ **Ivan Špoljarec - Štef** kaj ĝi beligas nian ejon en Knez Mislav.

S. Štimec

## Bona ideo el la jaro 2014

Zagreba banko festis en 2014 la centan jubileon ekde la fondiĝo. Okaze de la datreveno la Banko organizis tempan trezoron kaj invitis civitanojn kontribui al la ĝi. Post cent jaroj posedanto de la dokumento pri arkivigo en la trezoron povos ricevi sian objekton el 2014.

Kroata Esperanto-Ligo partoprenis en tiu evento kaj transdonis por arkivigo en la tempan trezoron en Zagrebo unu lernolibron de Esperanto! La numero de nia objekto gardata en la trezoro estas 10236. En januaro 2015 ni ricevis de Zagreba banko konfirmilon pri tio ke ni arkivigis iun objekton en tempan trezoron.

Mihaela Cik nome de Studenta Esperanto-Klubo same arkivigis Esperanto-lernolibron.

Kiu iros serĉi nian lernolibron en la jaro 2114 en la tempa trezoro de Zagreba banko, bonvolu kunporti la identigan numeron de nia objekto, kiun Zagreba banko planas gardi dum venontaj cent jaroj!

S. Štimec



## Eŭropaj himnoj kaj junulara premio de EU Karolo la Granda

Dum la Eŭropa Esperanto-Kongreso en **Rijeka** en 2014 la partoprenantoj havis la okazon konatiĝi kun la projekto Himnoj de Eŭropa Esperanto-Unio, kiun iniciatis kaj prizorgis **Flory Witdoeckt**. **Flory** havis ideon prezenti en unu filmo komencajn strofojn de ĉiuj 28 himnoj de la landoj de EU kaj montri al ni **Ostendan koruson** en kiu ŝi kantas dum kantado de eŭropa himno en Esperanto. Dum oni aŭskultas la taktojn de la unuopaj eŭropaj himnoj, oni povas spekti elektitajn vidindaĵojn el la concerna lando.

**Spomenka Štimec** iniciatis ke gejunuloj el Studenta Esperanto-Klubo kontribuu per siaj fotoj al prezento de **Kroatio** en la filmo. **Lucija Biličić** kontribuis plurajn siajn fotojn pri **Zagrebo**. Ankaŭ **Ivan Špoljarec** kaj **Davor Klobučar** kontribuis fotojn pri **Kroatio** kaj **Zlatko Tišljar** fotojn pri **Slovenio**.

Kiam ni informiĝis ke **Eŭropa Unio** invitas gejunulojn anonci siajn junularajn projektojn por Junulara Premio **Karolo la Granda 2015**, **Mihaela Cik**, prezidantino de Studenta Esperanto-Klubo, anoncis sian projekton pri unu komuna kaj 28 diversaj himnoj – unueco en diverseco. La unua premio estis 5000 eŭroj.

Plaĉis al ĵurianoj la projekto de **Mihaela** kaj ĝi ricevis 119 poentojn. Sed iu alia projekto estis je unu poento pli forta: la projekto kiu gajnis 120 poentojn povis gajni 5000 eŭroj.

Mankis al ni unu poento. Sed estis ekscite partopreni. Ĉu la gejunuloj konkuros en 2016 per iu alia projekto por la junulara premio **Karolo la Granda**?

S. Š.

## Prof. dr Ilona Koutny en Zagrebo

Inter la 18-a kaj 22-a de marto 2015 **Kroatio** vizitis Prof. dr **Ilona Koutny**, membro de la Akademio de Esperanto. Ŝi gastis en la simpozio organizita kadre de Finn-Ugra Instituto de la Filozofia fakultato de **Zagrebo**. Parton de sia restado en **Kroatio** ŝi dediĉis al la kroataj esperantistoj.

Marde, la 18-an de marto, Prof. **Koutny** faris la prelegon kadre de kluba vespero kiel gastoj de la Esperanto-societo **Tibor Sekelj**. La titolo de la prelego estis "Esperantlingva bildo de la mondo". Koutny, kiu estas ankaŭ gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj kaj gvidanto de la Finn-Ugra Katedro de Universitato **Adam Mickiewicz** en **Poznań, Pollando**, en sia prelego traktis diversajn problemojn, kiel ekzemple - ĉu *Esperanto entute prezentas iun propran bildon de la mondo aŭ nur spegulas aliajn (ekz. en kiu koloro kaj formo ni vidas la sunon); se jes, kian, kaj ĉu ni pensas en tiuj specialaj kategorioj, kiam ni uzas Esperanton?*

Pro la interesa temo, la publiko sufiĉe bone "kunlaboris" kun la prelegantino per komentoj, aŭ starigante demandojn al kiuj Prof. **Koutny** tuj donis klarigajn respondojn.

Sabate, la 21-an de marto, du esperantistoj



Sur la foto de Dalibor Ŝeatoviĉ D-rino Ilona Koutny kun Spomenka Ŝtimec kaj Neven Kovaĉić en Varaždin en la Tago de poezio la 21an de marto 2015

akompanis nian gastinon al la ekskurso al **Varaždin**, kie ŝi vizitis urbajn vidindaĵojn kaj renkontiĝis kun la verkistino **Spomenka Ŝtimec**. Ni dankas al prof. dr **Ilona Koutny** pro ŝia vizito al la kroataj esperantistoj. Pli multe pri ŝia prelego oni povas trovi per la jena ligo <http://www.amu.edu.pl/~inter/>.

Dalibor Ŝeatoviĉ

## Renovigo de la ejoj por infanoj kun handikapo en Krapinske Toplice

Esperanto-Societo **Trixi** el **Hraščina** finis en februaro 2015 la laboron pri rekonstruo de necesejo en Elementa lernejo ĉe Speciala hospitalo por rekapabligo en Krapinske Toplice. La Esperanto-Societo investis 25.000 kn por tiu laboro. La rekomendon al kiu loko kaj al kiuj handikapitaj infanoj iru la subvencio de Esperanto-Societo **Trixi** donis la Departemento Krapinsko-zagorska. La subvencio konsistis el pago por renovigo de necesejo. La departemento aldonis proprajn 3.000 kn por la rekonstruaj



laboroj. La laborojn faris la konstrufirmao Oro-dom el **Oroslavlje**.

Vicestrino de Departemento Krapinsko-zagorska **Jasna Petek** kaj direktoro de la lernejo **Antun Zupanc** kontentas pri la laboroj faritaj.

S.Š.

Vicestrino de la Departemento Krapinsko-zagorska **Jasna Petek** (dekstre) kun la direktoro de la lernejo **Antun Zupanc** kaj **Spomenka Ŝtimec**



## Antonija Jožič en la Nokto de la muzeo 2015

Turisma asocio de la urbo **Hrvatska Kostajnica**, Mezlernejo **Ivan Trnski** kaj Urba biblioteko **Milivoj Cvetnić** el **Hrvatska Kostajnica** kaj Turisma asocio **Sisačko-moslavačka** inspiriĝis per la laboro de Kroata Esperanto-Ligo por Lerneja muzeo en **Zagrebo** pri la unua traduko de la kroata verko ĉinen, realigita per la esperantlingva traduko de la romano **Konfeso** farita de **Antonija Jožič**.

Instruistoj kaj lernantoj de la lernejo preparis por la Nokto de la muzeo la 30an de januaro programon pri **Antonija Jožič**, esperantistino el **Hrvatska Kostajnica**, kiu en 1913 publikigis proprakoste sian tradukon de la verko **Konfeso** de la verkistino **Milka Pogačić** en Esperanto. Ŝia esperantlingva traduko estis poste uzita por ĉinigo de la verko en **Sanhajo** en 1931. El tiu libro kreiĝis la unua kontakto de la kroata literaturo kun ĉinaj legantoj.

Komuna programo de instruistoj kaj lernantoj honore al **Antonija Jožič** estis la dua engaĝiĝo de instruistoj en la Nokto de la muzeo en **Hrvatska Kostajnica** post 2014.

S.Š.

## Najbaroj invitas al Slovenio

Esperantista klubo Posavje kaj Slovenia Esperanto-Ligo invitas al IAER - Internacia amika esperantista renkontiĝo kiu okazos en **Brežice**, la 25-an de julio 2015. La programo omaĝos al la apero de la unua lernolibro de Esperanto, kiu aperis en julio 1887 en Varsovio. Eblis tranokti en la Hostelo de Junulara Centro **Brežice** kaj la sekvan tagon, dimanĉon, la 26-an de julio 2015, viziti turismajn lokojn, proksime al la urbo **Brežice**. Oni povas aliĝi ĝis la 30-a de junio 2015. Por pliaj informoj bonvolu skribi al **Anton Mihelič** al [antonmhl@gmail.com](mailto:antonmhl@gmail.com).

Tihana Mikša

## Se vi ne adaptos statuton de via Esperanto-asocio al la nova Leĝo pri asocioj, via asocio ekde oktobro 2015 ne plu funkcios

La redaktorino petis min skribi ĉi-numere artikolon pri gravaj aktualaĵoj en la Esperanto-movado en Kroatio el la vidpunkto de la prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo.

La plej grava aktualaĵo en Kroatio por ni esperantistoj estas la plej nova leĝo pri asocioj. Tiu leĝo reguligas la agadon de ĉiuj asocioj en nia lando. Al tiu nova leĝo devas submetiĝi kaj Kroata Esperanto-Ligo kiel tegmenta organizo, kaj ĉiuj niaj unuigoj, kluboj, asocioj-membroj de KEL.

La nova Leĝo pri asocioj preskribis ke ĉiuj organizaĵoj en Respubliko Kroatio registritaj kiel unuigoj (asocioj) devas akordigi siajn bazajn aktojn (statutojn) kun la nova Leĝo pri asocioj plej malfrue ĝis la 30a de septembro 2015. Sed ne ŝanĝiĝis nur tiu leĝo. Eĉ pli gravaj ŝanĝoj okazis en la sfero de financa reguligo de niaj unuigoj. Pri ĉio ĉi-tio ni devas zorgi en nia plua funkciado.

Dua afero estas financado: kiel kaj kie trovi la necesan monon por nia agado? Ĉu nia membraro entute konscias kiel malfacile estas certigi eĉ minimumajn financajn rimedojn? Tio estas des pli malfacila nun, kiam tuta nia socio baraktas kun financado de bazaj sociaj aktivecoj. Tiusence mi tuj konstato ke ni en nia tuta Esperanto-movado en Kroatio havas neniun personon kiu profesie laboru por Esperanto. La fakto ke ni havis profesian sekretariaton eblis, ĉar tiu profesia sekretario kapablis mem trovi monon por financi postenojn. Profesia sekretario zorgis preskaŭ pri ĉio ligita kun Esperanto nialande. Ekde kiam tiuj rimedoj por la posteno elĉerpiĝis kaj la sekretariato **Spomenka Štimec** pensiigis, ni lamas organize kaj finance. Tio signifas ke ni ĉiuj volontule laboras por nia movado - kiom kiu deziras kaj volas! Tiel estas en plej multaj mondaj Esperanto-asocioj.

El tio sekvas multaj problemoj pri kiuj nova Estraro (elektita antaŭ unu jaro) dum ĝiaj kunsidoj multe diskutas serĉante la solvojn, sed la rezultoj estas ankoraŭ nesufiĉe kontentigaj. Tamen ni klopodas plenumi almenaŭ minimumon de necesaj taskoj kiuj staras antaŭ ni kiel Estraro por ke nia Landa Asocio funkcii. Tiusence ni certigas ke

la oficejo en nia sidejo Knez Mislav 11 havu deĵoranton du foje semajne, ke la librotenisto kaj kasisto faru siajn laborojn kontentige, ke nia havaĵo en Vodnikova donu pozitivajn financajn rezultojn por kovri siajn elspezojn kaj elspezojn de siaj lastaj kreditoj kaj ankoraŭ iom da mono el Vodnikova restu por kovri parton de elspezoj en nia sidejo en Knez Mislav. Mi konkludu: „la kapo estas ankoraŭ super la akvo“! Gravan laboron daŭre faras la sekretariato de KEL, nun kiel volontulo de KEL.

La preparo de la novaj statutoj forprenas multan energion al ĉiuj Esperanto-asocioj en nia lando. La novelktita estraro finpreparis tiujn dokumentojn kaj la prezidanto dissendis konsilojn – instrukciojn al ĉiuj membroj, kiel plej facile adaptiĝi al la nova leĝo. Mi mem partoprenis en la jarkunveno de kelkaj niaj membroj-asocioj dum 2015.

Ni havis la jarkunvenon de Kroata Esperanto-Ligo la 23an de majo. Per ĝiaj decidoj ni oficialigis nian novan Statuton kaj plilongigis la oficialan ekziston de la asocio. Ĉiuj aliaj societoj havas tempon oficialigi siajn novajn statutojn en siaj komunumoj ĝis la 30a de septembro 2015. Post tiu dato la asocioj laŭ la malnovaj statutoj ne plu povos funkcii. Se vi daŭre volas funkcii kiel Esperanto-Asocio, bonvolu konsideri tiun daton.

Nun ni devas zorgi pri niaj statutoj. Plua afero traktenda estas agado de nialandaj esperantistoj por stabiligi nian organizitan movadon (spite al kelkaj nekontentuloj kiuj siatempe provis nian ŝipon direktigi sabloborden). Pri tiuj miskomprenoj en nia komunumo (kiun ni karese nomas „rondo familia“) mi nun ne skribos, ĉar postulus multan spacon por ĉion klarigi al vi, karaj legantoj.

Mi nur konstato ke nia Landa Asocio KEL pasintjare ricevis novan Estraron kiu entreprenis necesajn paŝojn adaptiĝi al novaj cirkonstancoj. Nia daŭra temo estas – financado de KEL.

Mi povus starigi la demandon al ĉiuj kiuj legas nian gazeton: kio estas por vi Kroata Esperanto-Ligo? Ĉu ĝin konsistigas nur la Estraro aŭ ĝin konsistigas la tuta organizita membraro (esperantistaj organizaĵoj kaj individuaj membroj)?! Volonte mi pri tiu temo artikolos sekvontnumere.

*Anto Mlinar*

## Deĵorantino en nia oficejo



**Tihana Mikša** (1982) volontulos dum venontaj monatoj deĵorante en niaj ejoj en Knez Mislav 11 marde de la 11a ĝis la 13a horo kaj mekrede de la 15a ĝis la 17a. Ŝi diplomigis pri sociologio kaj la ĉeĥa lingvo. Profesie ŝi laboras en la zagreba librovendejo - antikvaĵejo **Jesenski i Turk**. **Tihana** lernis Esperanton laŭ la iniciato de **Neven Kovačić** kaj lingve perfektigis kiel helpanto de **Spomenka Štimec** en la oficejo de KEL. Ĉu vi havas iun demandon pri Esperanto? Tihana estas je via dispono.

## Opatija invitas al Alp-Adria Konferenco en oktobro

Esperanto Societo el **Rijeka** kun sia partnero Triesta Esperanto-Asocio el **Triesto** invitas de la 9a ĝis la 11a de oktobro 2015 al **Opatija** por la **18a Alp-Adria Konferenco**.

**Opatija** estas dum 170 jaroj la gvida turisma urbo de **Adriatiko**. Vi trovos aliĝilon kun detaloj pri la programo en tiu ĉi numero de Tempo. Demandojn bonvolu adresi al la organizanto en **Rijeka**: [esperanto.rijeka@ri.htnet.hr](mailto:esperanto.rijeka@ri.htnet.hr).



*Boris Di Costanzo*

# Novajoj el Bjelovar

Kvankam Bjelovara Esperantista Societo ne havas propran ejon, la anoj diligente laboras kaj preparas kelkajn projektojn. Estraranoj regule kunsidas en la dolĉaĵejo **Zagorje**, kie estas, mi dirus, nia „tagĉambro“.

Jam planita estas la tradicia manifestacio **Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo** kiel parto de festado de Tago de la urbo **Bjelovar**. Ĉi-jare la evento okazos la 19-an kaj 20-an de septembro, kaj la partnera lando estos Ĉeĥio. La organizantoj preparos ekspozicion, libroprezentojn kaj la 3-an Deklamkonkurson, ankaŭ ĉi-foje kunlabore kun Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto (UPE) el **Zagrebo**. Oni recitos originalan kaj tradukitan poezion en Esperanto. La konkurso okazos en tri aĝkategorioj: lernantoj de elementaj lernejoj, lernantoj de mezlernejoj kaj plenaĝaj esperantistoj.

Ni invitas ĉiujn interesigantajn deklamantojn. Ili bonvolu kontakti **Marija Jerković**.

Jam estas konate, ke Bjelovara Esperantista Societo kune kun tri aliaj kroataj Esperanto-societoj prezentis kandidatigon por organizado de ILEI-konferenco en 2016 en **Bjelovar**. Same, estas konate ke la 49-a konferenco de ILEI en la jaro 2016, en la semajno post la 101-a UK en **Nitra, Slovakio**, okazos en **Nyíregyháza (Njireĝhaza), Hungario**.

Pro la kvalito de la bjelovara kandidatigo ILEI proponis al **Kroatio** organizi la unuan ILEI-festivalon de Esperantaj kulturo kaj pedagogio - ILEI-FEST kiu okazos en Bjelovar inter la 6-a kaj 13-a de aŭgusto 2016.

Membroj de la Organiza komitato jam fariĝis **Franjo Forjan, Zdenka Polašek, Nenad Margetić, Mirjana Saks, Grozdana Grubišić-Popović, Radenko Milošević, Marija Jerković, Josip Pleadin, Zdravko Seleš**, kaj kiel reprezentanto de ILEI **Radojica Petrović**.

Bjelovara esperantistoj, kiuj realigos la festivalon, havos vastan spektron de kulturaj, literaturaj, muzikaj, teatraj, filmaj, lingvaj, sportaj kaj aliaj programoj.

Do, ni ĉiuj havos multajn taskojn kaj devojn, sed ni ankaŭ havas deziron kaj emon bonege fari tiun gravan internacian manifestacion por kroata Esperanto-

movado, por nia urbo, departemento, regiono kaj lando.

Ĉi-jara, la 4-a jarkunveno de DEB okazos dimanĉe, la 24-an de majo je la 10:00h en la restoracio **Šenoa**.

**Bjelovara Esperantista Societo** kaj Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj kuneldonis la libron **La trajno en la neĝo**, de la infanverkisto **Mato Lovrak**. La verkon esperantigis **Josip Pleadin** kaj la libron ilustris per siaj desegnaĵoj lernantoj de la elementa lernejo **Mato Lovrak el Veliki Grđevac**. Ni dankas al la lernejestriĝo **Ivana Pavlečić**, la mentorinoj **Anita Reis** kaj **Marija Čičak** pro kunlaboro kaj ilia engaĝiĝo.

Ĉi tiun projekton finance helpis realigi la Departemento Bjelovar-Bilogora, la Komunumo **Veliki Grđevac** kaj Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj. Ni dankas al ĉiuj.

Se estos bela vetero, la oficiala libroprezento okazos la 27-an de majo, je la 10:00h, kiel parto de la manifestacio **La tagoj de Lovrak en Lovrak-centro, Veliki Grđevac**, kie troviĝas la malnova muelejo (el la libro **La kamaradaro de Petro Nodeto** kaj la vagonaro (samspeca kiel en la libro **La trajno en la neĝo**).

Se pluvos, ni rekontiĝos en la lernejo.

Vi povas legi pri nia agado en nia retadreso: [www.ipernity.com/home/250888](http://www.ipernity.com/home/250888)

*Grozdana Grubišić-Popović*



*Fotis Lucia Popović*

## Kaja Farszky en la muzika festivalo Biennale Zagrebo 2015

Ĉiun aprilon post 1961 **Zagrebo** transformiĝas al muzika centro de la tuta regiono. La tuta festivalo estas dediĉita al la moderna muziko kaj ĝiaj „klasikuloj“, samkiel al la nova generacio de komponistoj. Juna kroata muzikistino (kaj estrarano de KEL) **Kaja Farszky** ĉi-jare muzikis en la Biennale de la 18a ĝis la 25a de aprilo 2015 kune kun la pintkvalitaj profesiaj muzikistoj de **Eŭropo**. Sur la foto de **Zvonimir Ferina, Kaja Farszky**, muzikanta je perkutinstrumentoj en la muzika verko **La nevidebla tempo**, kiun komponis **Ana Horvat**.

*K. Farszky*



## Omaĝe al la verkisto Joža Horvat

La kroata verkisto **Joža Horvat**, kiun kunlaborantoj de Kroata Esperanto-Ligo **Probal Dashgupta** kaj **Hu Zhuo** tradukis kaj publikigis en la bengala en **Kolkato** kaj en la ĉina en **Wuchan**, ricevis omaĝtabulon sur la fasado de sia domo en la strato **Medveščak** en **Zagrebo**.

“En tiu ĉi domo vivis kaj verkis la kroata verkisto kaj marvojaĝanto **Joža Horvat**, naskita en **Kotoriba** en 1915. Mortis en **Zagrebo** en 2012.”

S.Š.

*Fotis Kikushima Kazuko-Krizantemo*





## LA LOĜEJO EN VODNIKOVA 9 EN ZAGREBO ESTAS LA NIA

Dank' al la du lastaj tre grandaj donacioj al Kroata Esperanto-Ligo por niaj ejoj en Vodnikova 9 (de **Blanka Pavlović-Devčić** kun 37.000 kunaoj kaj **Anto Matanović** kun 40.000 kunaoj), Kroata Esperanto-Ligo sukcesis elpigi kompletan ŝuldon de la plej granda kredito por nia estonta sidejo en Vodnikova 9. La unua kaj la plej granda kredito estis la kredito de 50.500 eŭroj ricevita en la jaro 2003 de Raiffeisen-banko en **Zagrebo**. La monata partopago por KEL estis tiam tre alta kaj ni estis en malfacila financa situacio. Post du jaroj en 2005 nia membro **Nedeljko Korasić** donis al KEL novan krediton de 40.000 eŭroj sub pli favoraj kondiĉoj ol estis la bankaj. Intereso estis 2 procentojn malpli granda ol la banka kaj la tempo de repagado estis en la nova kredito pli longa. Per la ricevita 40.000 eŭroj tuj estis repagita la kredito al la banko Raiffeisen. Gravis por KEL ke ĉe la komenco de la uzo de la anstataŭiga kredito ni ricevis unu jaron da prokrasto antaŭ ol ekrepagi la kapitalon. Ankaŭ la duan fojon ni kontraktis novan prokraston de repago de la kredito je 18 monatoj, kiam KEL estis devigita investi monon por enkonduko de centra hejtado en nia nova ejo (Davor Klobuĉar pruntis 4.600 eŭrojn por enkonduko de la nova centra hejtado kaj tiu kredito tuj estis repagita dum la granda kredito en la tempo de repagado de hejtiloj iom paŭzis). Vere **Nedeljko Korasić** per dono de kredito al sia landa asocio multon helpis por trankvile ĝisatendi repagon de aliaj ekstermovadaj kreditoj por Vodnikova. Ni devas danki al ĉiuj esperantistoj kiuj sindone konstante donacadis helpojn por repagi la kreditojn. Niaj membroj kaj subtenantoj per pli ol 750 enpagoj kolektis entute la sumon de 45.621,79 eŭroj por helpi aĉeti niajn ejojn en Vodnikova. Nun restis ankoraŭ du kreditoj repagendaj. Feliĉe KEL ne plu ŝuldas al kruelaj bankaj institucioj. Temas nun pri kreditoj de esperantaj organizoj: KEL ŝuldas al Esperanto-societo **Trixini** el **Hrašćina** krediton de 13.747,92 eŭroj kaj al **Esperanto Societo Rijeka** krediton de 2.934 eŭroj. Fakte nia loĝejo en Vodnikova jam estas la nia, ĉar se ekaperos malfacilaĵoj en la estontaj repagoj de la kreditoj al la esperantaj organizoj, ni tiajn problemojn inter ni povos solvadi pli facile kaj sendanĝere. Por kompreni la gvidadon de la laboroj ligitaj al Vodnikova ni devas akcenti ke Vodnikova repagis sin mem per sia gajno de mono de loĝantoj kiuj loĝis tie. KEL praktike nun vivas de Vodnikova ĉar enspezoj de Vodnikova estas ĉ. 3.600 kunaoj monate kaj el tio restas certa sumo post monata kreditelpago, se sekretariino de KEL, **Spomenka Štimec**, sukcesas trovi konvenajn loĝantojn por ĉiuj niaj ejoj.

Grandan dankon al ĉiuj donacintoj, al **Nedeljko Korasić** kiel granda kreditanto, kaj al ĉiuj kiuj multe laboris por ordigi la aferojn pri aĉeto,

repago kaj konstanta mastrumado pri Vodnikova. Ni menciuj almenaŭ la plej gravajn administrantojn de la kredito: **Spomenka Štimec**, **Ljerka Stilinović**, **Jadranka Farszky**, **Ruža Tišljar**, **Bojana Đuričić**, **Davor Klobuĉar**, **Lidija Matašić**, **Anto Mlinar**.

*Vjekoslav Morankić*

Noto de la redaktoro:

Kaj ni ne forgesu ke ni ne povus havi niajn ejojn en Vodnikova 9, se per siaj fakaj scioj ne gvidus la laboron pri la kreditoj de KEL la subskribinto de ĉi tiu artikolo **Vjekoslav Morankić**. Tute specialan dankon al **Boris Di Costanzo**, kiel prezidanto de Esperanto Societo Rijeka, la kunŝuldanto por la kredito.

## Vodnikova 9 nia estonta ejo

726. Slobodan Kukić	1,32 eŭroj
727. Ivo Osibov	14,28 eŭroj
728. Davor Klobuĉar	10,00 eŭroj
729. Dinka Šimunić	2,64 eŭroj
730. Marija Horvatić-Kapelac	14,28 eŭroj
731. Ivan Rašić	31,70 eŭroj
732. Josip Brkanac	19,80 eŭroj
733. Vanja Radovanović	26,42 eŭroj
734. Goran Lakotić	2,64 eŭroj
736. Željko Gubijan	14,28 eŭroj
737. Marta Živković	6,60 eŭroj
738. Emilija Obradović	10,56 eŭroj
739. Olga Štajdohar-Pađen	5,28 eŭroj
740. Anonima	14,28 eŭroj
741. Boris Di Costanzo	14,28 eŭroj
742. Josip Brkanac	14,28 eŭroj
743. Krešimir Jerić	14,28 eŭroj
744. Olga Srkoč	14,28 eŭroj
745. Željka Treer	5,28 eŭroj
746. Tomislav Treer	5,28 eŭroj
747. Blanka Pavlović-Devčić	66,05 eŭroj
748. Anonima	14,28 eŭroj
749. Ankica Janković	14,28 eŭroj
750. Anto Matanović (Memore al Mira Matanović-Manner kaj Mirko Mamužić-Manner)	5.284,01 eŭroj

Inter oktobro 2014 kaj aprilo 2015 KEL kolektis inter siaj membroj 5.620,38 eŭrojn por la ejo en Vodnikova. Ekde la jaro 2003 KEL kolektis inter siaj membroj 45.621,79 eŭrojn.

Aliaj kaj lastaj kreditoj:

Kredito al Esperanto-Societo „Trixini“ 13.747,96 eŭrojn.

Kredito al Esperanto-Societo Rijeka: 2.934,83 eŭrojn.

Dankon al la membroj kiuj helpis al ni havi la propran Esperantejon en Zagrebo!

Nia bankonumero en Raiffeisenbank: Hrvatski savez za esperanto IBAN HR6124840081100881157.

### Memorigo:

Kiam ni aĉetis nian ejon en Vodnikova en 2003, ni pagis por la ejo 108.000 eŭrojn. Ni devis pagi aldone la imposton de 5.000 eŭrojn. Sume ni pagis 113.000 eŭrojn.

Kiam ni translokiĝos al Vodnikova? La posedanto de la ejo en Knez Mislav estas la kroata ŝtato, kiu en 2015 ne difinis per kontrakto la limdatojn de la uzo de la ejo. Ni farbigis unu el tri niaj ĉambroj en Vodnikova 9 en 2015 kaj preparas la renovigon de elektraj instalaĵoj en kuirejo dum printempo 2015.

**Zdravko Seleš**, nia konata esperantisto kaj literaturisto, ĝojigis nin per sia nova libro **Galović i zadne stvari (Galović kaj lastaj aferoj)**. Ĉar la libro konsistas el elektitaj eseoj kiujn la aŭtoro skribis dum sia pli ol 30-jara literatura kaj kultura agado, estas kompreneble ke inter ili troviĝas ankaŭ iuj pri literaturo kaj verkistoj. Nome, tri eseojn originale verkitajn en Esperanto **Seleš** tradukis por neesperanta publiko. Temas pri la eseoj **Sepultejo por Danilo Kiš** el 1990, **Onklo Maroje: Komedio pri mishomoj kaj veraj homoj** el 2010 kaj pri la premiita eseo **Nova realismo de Mikaelo Bronštejn aŭ eta traktato pri legantoj** el 2011. Esperanto estas ankaŭ menciita en la eseo pri la libro **Svetlo i sjena/Lumo kaj ombro de Ivan Golub** kaj en la eseo pri la kroata verkisto kaj esperantisto **Đuro Rašan**. Tiel **Zdravko Seleš** denove montras ke Esperanto estas tre grava parto de lia kreado kaj vivo. Sed, oni ne devas forgesi pri la aliaj interesoj. En la libro **Galović kaj lastaj aferoj** troviĝas plejparte eseoj pri **Podravina** kaj, pli vaste, pri la hejmloko kaj fenomeno de hejmeco. Tial estas nepre menciinde, ke la libro estis eldonita en 2014, la jaro de la 100-a mortdatreveno de la granda kroata poeto **Fran Galović** el **Podravina**.

La aŭtoro prezentis la libron **Galović kaj lastaj aferoj** la 15-an de decembro 2014 dum Zamenhoftaga festo en **Zagrebo** kaj sekvis aliaj prezentadoj. La 9-an de januaro 2015 la libro estis prezentita en **Đurđevac**, hejmurbo de **Zdravko Seleš** kaj la 15-an de aprilo 2015 en la Tribuno de Asocio de kroataj verkistoj (Društvo hrvatskih književnika) en **Zagrebo**. En la Tribuno estis ankaŭ prezentita trilingva libro **Snovi i sjene/Senje i**

**tenje/Sonĝoj kaj ombroj** eldonita en 2012, el kiu la aŭtoro deklamis siajn poemojn. Tiamaniere, dank' al la prezentado de du libroj de elektitaj poemoj, eseoj, recenzoj kaj tradukoj, oni povis senti la veran etoson de tuta literatura kreado.

Kun **Galović kaj lastaj aferoj** kaj **Sonĝoj kaj ombroj** en manoj kaj pensoj ni atendas novan libron de **Zdravko Seleš**.

*Mihaela Cik*

Tempo honoras la poeton **Fran Galović** okaze de la centa datreveno de lia morto per la ĉi-numera publikigo de lia poemo **Kaŝtanarbo** en traduko de **Josip Velebit**.

Fragmento el la eseo **Galović kaj lastaj aferoj** estis ankaŭ publikigita en la revuo **Kaj**, numeroj 5-6 de la jaro 2014.

*Lada Žigo, Enerika Bijač, Zdravko Seleš kaj Mihalea Cik.  
Fotis Ivanka Seleš*



Pagita anonco



ESPERANTO DRUŠTVO  
RIJEKA  
ESPERANTO-SOCIETO  
RIJEKA  
Blaža Polića 2  
HR-51000 Rijeka

tel: 051-334-670

esperanto.rijeka@ri.t-com.hr

## SPEZOKONTO 2014

ENSPEZOJ - PRIHODI	2013		2014	
	HRK	EUR	HRK	EUR
Servoj – Od usluga	6.769	886	13.086	1.708
Kotizoj - Članarina	1.718	225	1.150	150
Lupagoj – Od imovine	38.329	5.019	46.920	6.124
Donacioj - Donacije	3.500	458	25.500	3.328
Diversajxoj - Ostalo	12.589	1.648	8.255	1.078
<b>ENTUTE - UKUPNO</b>	<b>62.905</b>	<b>8.236</b>	<b>94.911</b>	<b>12.388</b>

## PRIHODI, RASHODI 2014

ELSPESZOJ - RASHODI	2013		2014	
	HRK	EUR	HRK	EUR
Vjaĝoj – putni troškovi	8.209	1.075	8.647	1.129
Materijaloj - Matrijal	10.894	1.426	15.621	2.039
Servoj - Usluge	26.719	3.498	43.005	5.613
Diversa materialo – Ostali mat.	3.396	445	4.662	608
Financaj kostoj-Financ. trošk.	1.114	146	3.721	486
Donacioj - Donacije	100	13	300	39
Amortizo - Otpis	6.920	906	1.610	210
<b>ENTUTE - UKUPNO</b>	<b>57.352</b>	<b>7.509</b>	<b>77.566</b>	<b>10.124</b>
<b>GAJNO – VIŠAK PRIHODA</b>	<b>5.553</b>	<b>727</b>	<b>17.345</b>	<b>2.264</b>

BILANCO 31-12-2014	2013		2014	
	HRK	EUR	HRK	EUR
<b>AKTIVO - IMOVINA</b>				
Teren – Zemljište	22.908	2.999	22.908	2.990
Esperanto Domo	919.699	120.417	903.621	117.944
Mebblajxo – Namještaj	880	115	710	93
Amortizo – Otpis	-19.864	-2.601	-16.266	-2.123
Bankkontoj – Novac u banci	5.553	727	17.345	2.264
Aliajxoj – Ostalo	6.920	906	2.702	352
Debitajxoj - Potraživanja	50.432	6.603	74.864	9.772
<b>SUME - UKUPNO</b>	<b>986.528</b>	<b>129.166</b>	<b>1.005.884</b>	<b>131.292</b>
<b>PASIVO - DUGOVINA</b>				
Kapitalo – Vlastita sredstva	929.175	121.657	928.318	121.168
Keditaj saldoj - Obveze	57.353	7.509	77.566	10.124
<b>SUME - UKUPNO</b>	<b>986.528</b>	<b>129.166</b>	<b>1.005.884</b>	<b>131.292</b>

## Esperanto en mia vivo

... Mia plej bona tiama amikino estis el Hungario, kun ŝi mi longe en noktoj parolis pri ĉio, kvankam eĉ unu hungaran vorton mi ne konas. Mi partoprenis plurajn kongresojn... Kun nostalgio mi rememoras tiun tempon kaj ankoraŭ nun mi kredas je la ideo de la internacia lingvo.

*Marija Franz*

(en 2008 por **Osijeka Sonorilo**)

*Ŝia plena raporto estas en [http://www.esperanto.hr/osijeka\\_sonorilo\\_2.pdf](http://www.esperanto.hr/osijeka_sonorilo_2.pdf) paĝo 18.*

## Kumeŭaŭa en la franca



La plej ofte tradukata libro de **Tibor Sekelj**, **Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo** en 2015 ricevis sian francan tradukon de **Anne Jausion**. La franca titolo de la libro estas **Kumewawa, Le fils de la jungle**. La verkon ilustris **Violaine Macquet** kaj eldonis Dokumenta Esperanto-Centro en **Durĉevac**.

**Tibor Sekelj** certe tre ĝojus vidi la franclingvan eldonon 103 jaroj post lia naskiĝo. Dum lia vivo aperis ĉefe tradukoj al grandaj aziaj lingvoj. Danko al la brila traduko japanen en Japanio la libro ricevis atenton de instanacoj kiuj difinas devigan legaĵon de gelernantoj. Tial imponis ĝia eldonkvanto en la japana en 300.000 ekz.

*A.J.*

## Hlapić – represita en la persa



De nia kunlaborantino **Akhtar Etemadi** el **Teherano** ni ricevis informon, ke en la 28a Teherana Librofoiro okazinta de la 6a ĝis la 16a de majo 2015 estas ekspoziciita la nova eldono de **Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić** de **Ivana Brlić-Mažuranić**. La unua eldono de **Hlapić** estis presita en **Teherano**

en la traduko de **Akhtar Etemadi** en 10 000 ekzempleroj en la jaro 2005 ĉe la prestiĝa persa eldonejo **Kanoon Pervareshi Fekri Kodakan**. La libron ilustris **Mohamed Reza Lavasani**. La persa **Hlapić** elĉerpiĝis kaj ne plu estis aĉetebla. **Akhtar Etemadi** entreprenis la paŝojn por stimuli novan eldonon. La rezulto venis en 2015, dek jarojn post la unua apero de **Hlapić**. La eldonkvanto de la dua eldono de **Hlapić** en la persa estas 5 000 ekz.

Kroata Esperanto-Ligo sendis la informon pri la nova eldono de **Hlapić** en la persa al la novelektita ministro pri kulturo **Berislav Šipuš**. La ministerio ekde aprilo 2015 decidis ne plu financi la regulan kulturelan agadon de Kroata Esperanto-Ligo.

*S. Ŝtimec*

## Nekrologoj

**MARIJA FRANZ** (nask. Stipandić)  
(1957 – 2014)

**Marija Franz** (nask. **Stipandić**) naskiĝis la 23-an de oktobro 1957 en **Bihać (Bosnio kaj Hercegovino)** mortis en **Osijek** la 21an de decembro 2014. Finis gimnazion en **Virovitica** kaj Ekonomian fakultaton en **Osijek**. Dum jardekoj ŝi laboris en Ŝtata oficejo pri reviziado, en ties regiona oficejo en **Osijek** kiel supera ŝtata revizoro. Esperanton eklernis aŭtodidakte en 1970 kiel gimnazianino (per magazino por junulinoj **Tina** kiu enhavis esperantan kurson). Membro de la osijeka Esperanto-Societo Liberiga Stelo ekde 1981. Komence laboris en **Virovitica** kaj revenis al **Osijek** en 1985. Ofte organizis renkontiĝojn inter osijekaj kaj hungaraj esperantistoj, speciale kun tiuj el la najbara regiono de **Hungario**, kiuj fariĝis tiom bonaj amikoj de la osijekanoj, kvazaŭ ili estus familianoj. Gvidis plurajn Esperanto-kursojn kiuj poste rezultis per kelkaj tre aktivaj osijekaj esperantistoj: **Ivan Flanjak**, **Antun Ŝimunić**, **Viŝnja Branković**. En unu tia kurso ŝi ekkonis sian postan edzon. Post 1991 ne plu ofte aktivis en la movado (krom en la medicinista konferenco **IMEK** en **Osijek** 2001 kaj per partopreno en Montkabana renkontiĝo), sed Esperanto restis ŝia idealo kaj vivo-koncepto.



*Davor Klobuĉar*

**ALEKSANDAR KOCIAN** (Saŝa)  
(1930 – 2015)

**Aleksandar Kocian** (konata kiel **Saŝa**) naskiĝis la 5-an de oktobro 1930 en **Osijek** kaj finis tie realgimnazion. Ekde 1953 ĝis la emeritiĝo en 1991 estis oficisto en la osijeka urb-ordiga firmao Unikom. Ekde 1993 longtempa sekretario en la emeritula organizo por la centro de **Osijek**. Parolis esperante kaj germane. Esperantistiĝis en 1950 en Zagreb en la kurso gvidita de **Lucija Borĉić**. Ekde 1971 preskaŭ seninterrompe sekretario de Esperanto Societo **Liberiga Stelo** en **Osijek**. Delegito de UEA ekde 1971 ĝis la morto. Partoprenis 14 UK-ojn. Lia ŝatata vivoverko estis tradukado el Esperanto al la kroata lingvo de la hungara romano „Sklavoj de Dio“ de **G. Gardonyi**, kion li, kvankam nesufiĉe lerta pri la literatura kroata lingvo, sukcesis fini. Kaj tiu traduko „Boĵji robovi“ publikiĝis per liaj financaj rimedoj 4 jarojn antaŭ lia vivofino. Lia nomo estas ankaŭ sur titolpaĝoj de pluraj esperantaj vortaroj verkitaj en **Osijek**. Iom malprave, ĉar li ne elstaris per laboro lingva, sed organiza. Kaj multege li elstaris per la laboro organiza en la klubo. En ĉiu momento li estis preta fari sen plendo ĉian ajn laboron por Esperanto. Kaj sennombre multe da utilaj servoj li faris, pro kio ni devas esti al li dankaj.



*Davor Klobuĉar*

[Pluraj fotoj ĉe [http://www.esperanto.hr/aleksandar\\_kocian\\_omagxe.htm](http://www.esperanto.hr/aleksandar_kocian_omagxe.htm)]

**Fran Galović (1887-1914)**

## **Kaŝtanarbo / Kostanj**

Amik' malnova, kial tia bru'?  
Malfrua nokt'! Ĉu bone resti sen dormĝu'?  
„Delonge vin rigarde mi meditas  
Kiel pezas viv', se saĝas kap' kaj spritas!“  
Ke temas pri riproĉ' al mi ne mankas sci',  
Povas vi riproĉi, estas sole mi.  
„Ne riproĉas sed rigardas mi konstante  
Malĝojon, pensojn viajn komprenante.“  
Ne, mi ne malĝojas, vivas sen malĝoj'  
Mi eĉ trinkas iom kaj min kaptas ĝoj'!  
„Sed kio morgaŭ, kio poste venos,  
Se vin ploreĉ' pro tiu tero premos?“  
Zorgon plu al mi ne faras la estont'  
Plori mi ne scias – jen tuta respond'!  
„Sed diru, dum ni solaj nun parolas,  
Ĉu tiu ter' vin tute ne allogas?  
La reven' ne eblas, eĉ se estus vol',  
Alia vivo kaptis min kaj portis for'  
„Ĉi vivo havis pli da bel' kaj dolĉo,  
Kaj restus vi, se konus ĝian sorĉon!“  
En ĉi landparto mi scias sole pri dolor'  
En tombo jam duono kuŝas de ĉi kor'.  
Se vi l' oldulojn konus kiaj ili estis,  
Kiel ĉe l' ag' kaj glas' korgoĝojn festis!“  
Tamen mortis, en tombej' ilia lit'  
Nun de aliaj vivo pasos en ĝojo kaj rid'.  
„Se vi ĉi stelojn konus kaj ĉielon  
Kaj tiun vin vokantan hejman teron!“  
Tro mi ĉion hejme konas kaj pro kon'  
Mi ne trovas kie voj' al mia dom'.  
„Ho, venu, ĉio ne forpasis, se vi volos,  
Juneco-floroj ruĝe reekfloros!“  
Bonan nokton, kara! Regas dormohor'  
Nur lumbrilo kviete paŝas apud voj'!

*Tradukis Josip Velebit (1911-2000)*